

Ernst Moritz Arndt,

Alaŭdokanto

tradukita de Manfredo Ratislavo

Se havas kordon vi, maljuna kor',
 Surmetu ĝin kaj ĝin sonigu!
 Al la stelar' pri l' am-dolor'
 La plenan kanton vi konigu!

Altege sonas kant' en la aer',
 Reeĥas ĝi en sino via,
 Ne pri feliĉo sur la ter',
 Pri la anĝela ĝojo sia.

Alaŭdo, supren! Fuĝu alten de
 Ĉi tiu suba ter-pelmelo!
 Jen sonas eh' por via ve':
 Restrebu vi al la ĉielo!

*Traduko de la Germana poemo "Lerchengesang" de ERNST MORITZ ARNDT (*1769 – †1860) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2005-09-26.*

MR-441-1 / Arg-328-662 (2005-09-28 07:59:08)

Mi trovis tiun ĉi poemon en la libro "Deutscher Dichterwald, Lyrische Anthologie" de Georg Scherer, eldonita en 1890 de Deutsche Verlagsanstalt, Leipzig (Lepsiko). Mi dediĉas la Esperantigon de la poemo al mia najbaro Herbert Schmücker, kiu donis la libron al mi.